


181  
SIFRKO

El la enhavo:  
Printempo venas  
Danĝeraj vortoj  
Interredaktore  
Du malsamaj mondoj  
Kroniko socia  
Libroservo  
Tra Esperantujo



**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



*Gvidanto de la ĈEA-libroservo  
Zdeněk Pluhař kaj membro de la inventara  
komisiono kaj vicprezidanto de ĈEA Věra  
Podhradská kontrolas staton de libroj.*

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
aperas 6-foje jare. Abono 16 gld.

E-mail de Starto: starto@clavis.cz

E-mail de ĈEA: cea@tmet.cz

TTT de ĈEA: <http://www.kuk.cz/cea/>

Komercaĵ anoncoj: 25 Kč por unu linio,  
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por  
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla  
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%  
rabato.

Membrokotoj: A 160 Kč, B 80 Kč, (C  
nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G  
100 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20  
ECU, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 335 Kč komencantoj,  
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Blanka Gruntova,  
Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova  
658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

Sekcioj de ĈEA: infana, junulara, skolta,  
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-  
na, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-  
amikara, de esperantaĵ-kolektantoj

Komisioj de ĈEA: gazetara-informa,  
ekzamena

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100,  
Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,  
747 05 Opava, tel: 0653/611 823

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878,  
252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso  
02.9912126

Vicprezidanto: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603  
00 Brno, tel. 05/4323 3047

Sekretario: Květa Krajččková, Esperanto, p.s.  
1069, 111 21 Praha 1

Komitatano: Blanka Gruntová, Vítězná 95,  
784 01 Červenka-Litovel

Komitatano: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1,  
696 62 Strážnice, distr. Hodonin, tel. 0631/332  
278, fakso 0631/332 507

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží

45/25, 736 01 Havířov. tel. 069/6815253

Kontrolgrupo de ĈEA: Jana Holcová,  
Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj:  
Josef Hron, Libuše Krejčí)

Kontisto: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147  
00 Praha, tel: (02) 4446 0162

Ĉefdelegito de UEA: Stanislava Chrdlová,  
Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel.  
02.9912201, fakso 02.9912126

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724  
0690

## Variabilní symboly pro platby ČES

- 311 expedice, úhrada koupených knih
- 604.2 písemné kurzy
- 604.3 předplatné Starto
- 604.5 předplatné Internacia Fervojisto
- 668 dary svazu
- 694 členské příspěvky ČES
- 694.1 členské příspěvky UEA
- 789.1 sekce mládeže
- 789.10 sekce šachistů
- 789.11 sekce sběratelů
- 789.13 Sciencia revuo
- 789.15 ediční fond, Ringo
- 789.16 subkonta klubů mimo uvedených
- 789.17 Sekce nevidomých
- 789.19 Propagace v reg. tisku
- 789.3 sekce železničářů
- 789.7 sekce pedagogů
- 789.71 ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo)

Variabilní symbol uvádějte na přední straně  
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do  
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.  
Upozornění pro majitele účtů u jiných bank!  
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte  
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVAK  
PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC  
apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol.  
Dojde-li platba s označením „ČESKÝ ESPE-  
RANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme, kdo a  
proč platí. Takové úhrady účtujeme jako dary  
svazu.

ISSN 1212-009X

## Printempo venas

La 21-a de marto estas nomata la unua printempa tago. Ĉi tiu nomo estas evidente simbola. Sed kial? Unue, la 21-a de marto estas la tago de ekvinokso, de ĉi tiu dato la tagoj estas jam pli longaj ol noktoj. La fino de marto estas regule karakterizata per principa ŝanĝo de vetero. La evoluo de vetero en unuaj monatoj de jaro nature dependas de akreco kaj longeco de vintro.

La unuajn simptomojn, ke vintro finiĝos kaj venos printempo, ni povas observi de la komenco de la jaro. Jam komence de januaro frajas lojto (ĉeĥe: *mník jednovousý*). Ĉirkaŭ mezo de januaro povas esti aŭdata la unua kanto de granda paruo (*sýkora koňadra*), fine de januaro komencas ululi gufo (*výr velký*) kaj pariĝas leporo.

Februaro jam estas pli riĉa je simptomoj de komenco de printempo. Depende de la vetero aperas unuaj printempaj floroj heleboro (*čemeřice*), nomata anakaŭ „vintra rozo“, galanto (*sněžěnka podsněžník*) kaj leŭkojo (*bledule jarní*). Iam jam en februaro floras avelo (*líška obecná*) kaj kaprosaliko (*vrba jíva*). En februaro pariĝas vulpo, sovaĝa kuniklo kaj sciuro, ursino en sia vintra kuŝejo akuŝas ursidojn. Revenas unuaj migrantaj birdoj: griza ansero (*husa velká*), vanelo (*čejka chocholatá*) kaj kampalaŭdo (*skřivan polní*). Oni povas aŭdi unuajn provojn de merlo (*kos černý*)



pri kanto.

En marto floras arboj betulo (*bříza bělokorá*), alno (*olše lepkavá*), avelo, kaprosaliko, blanka poplo (*topol bílý*), nigra poplo (*topol černý*) kaj tremolo (*topol osika*). Ekfloras tipaj printempaj floroj: anemonoj (*sasanky*), hepatito (*jaterník podléška*), pulsatiloj (*koniklece*), kalto (*blatouch bahenní*), fikario (*oršej jarní*), pulmonario (*plicník lékařský*), tusilago (*podběl léčivý*), hiacinto, krokusoj (*šafařány*). Elkreskas printempaj fertilaj tigoj de kampa ekviseto (*přeslička rolní*). Aperas jam unuaj fungoj: morĥeloj (*smrže*) kaj verpo (*kačenka česká*). El vintra dormo vekigiĝas erinacoj kaj vespertoj. Melo (*jezevec lesní*) akuŝas melidojn kaj elrampas post vintro de sia kuŝejo. Pariĝas linko (*rys ostrovid*). Akuŝas ankaŭ sovaĝporko, musteloj (*kuny*) kaj sciuro. Komenciĝas reduktado de sorikoj (*rejsci*), mikrotoj (*hraboši*), arbarmusoj (*myšice*) kaj ondatro. Forflugas frugilego (*havran polní*), kiu ĉe ni travintris. Revenas multaj specioj de birdoj, ekzemple greboj (*potápky*), blanka cikonio (*čáp bílý*), anasoj, nigra fuliko (*lyska černá*), skolopo (*sluka lesní*), galinago (*bekasina otavní*), ridmevo (*racek chechtavý*), ringkolombo (*holub hřivnáč*), ruĝgorĝulo (*červenka obecná*), nigra ruĝvostulo (*rehek domáci*), kamphirundo (*vlaštovka obecná*),



fringo (*pěnkava obecná*), verda kardelo (*čížek lesní*), blanka motacilo (*konipas*



*bílý*), montara motacilo (*konipas horský*) kaj sturno (*špaček obecný*).

Komenciĝas aktiveco de amfibioj (*obožživelní*): trituroj (*čolci*) kaj ranoj (*skokani*), eble ankaŭ bufoj (*ropuchy*). El fiŝoj frajas ezoko (*štika obecná*), hondrostomo (*ostroretka stěhovavá*) kaj ĉoto (*vranka obecná*). En malaltaĵaj marĉlagetoj povas aperi krustuloj: printempa anostrako (*žabronožka sněžní*) lak lepiduro (*listonoh jarní*).

En aprilo ekfloras pluaj arboj: karpeno (*habr obecný*), kverkoj, fago (*buk lesní*), salikoj (*vrby*), aceroj (*javory*), frakseno (*jasan ztepilý*), ĉerizarbo, prunarbo, abrikotarbo, persikarbo, pirarbo, prunelarbeto (*trnka obecná*), ruĝa ribarbeto (*rybíz červený*), grosarbeto (*srstka obecná*), forsitio (*zlatice převislá*) kaj fine de aprilo siringo (*šeřík obecný*). Floras fragario (*jahodník obecný*), printempa adoniso (*hlaváček jarní*), grandflora stelario (*ptačinec velkokvěrý*), printempa primolo (*prvosenka jarní*), leontodo (*pampeliška lékařská*), lekanto (*sedmikráska obecná*), tulipo kaj narcisoj.

El vintra dormo vekigigas zizelo (*sysel obecný*), kaj gliroj (*plši*). Pariĝas putoroj

(*tchoři*), ermeno (*lasice hranostaj*), kaj galputoro (*lasice obecná*). Revenas pluaj birdoj, ekzemple turto (*hrdlička divoká*), kukolo (*kukačka obecná*), kaprimulgo (*lelek lesní*), upupo (*dudek chocholatý*), kolordulo (*krutihlav obecný*), ĝardena ruĝvostulo (*rehek zahradní*), murhirundo (*jiříčka obecná*), sovaĝa kanario (*zvono hlík zahradní*). Ĉiuj birdoj komencas konstrui nestojn.

Komenciĝas aktiveco de reptilioj (*plazi*), aperas amfibioj: salamandro (*mlok skvrnitý*), bombinoj (*kuňky*), bufoj (*ropuchy*) kaj hilo (*rosnička zelená*). Frajas iuj fiŝoj: timalo (*lipan podhorní*), leŭcisko (*jelec proudník*), iduso (*jelec jesen*), fokseno (*střevie potoční*), aspio (*bolen dravý*), perko (*okoun říční*), perĉo (*ježdík obecný*), sandro (*candát obecný*). Aperas unuaj papilioj: pieridoj (*bělásci*), koliaĵoj (*žluťásci*) kaj vanesoj (*babočky*).

Majo estas jam plena printempo, ekfloras pluaj arboj kaj floroj, revenas pluaj birdoj, naskiĝas kaj eloviĝas idoj.

Tiu procedo de printempo, kiun mi provas priskribi, estas nur teoria kaj konformas al averaĝa jaro.

RNDr. Evžen Wohlgemuth



Sub la „danĝera“ mi aŭdacas kompreni tian vorton, kia estus tre malfacile digestebla por sciencisto, perspektiva adepto de Esperanto. Ĉar la legantaro de STARTO evidente jam trosatiĝis per miaj senfinaj konsideroj, ĉi-loke mi limigos min nur al kelketo da vortoj. Nature, pri ili kaj pri aliaj mi pretas dum mia vivresteto kviete diskuti kun ajna terminologo.

1. ekzistencialismo (PIV, 1970) estas internacie stabiliginta filozofia termino. Tamen, „ekzistadismo“ trovebla sub la fundamenta radiko ekzist- perfidas sia-specan ŝizofrenion, ĉar la vortaro timante, ke oni ne komprenus, kion ĝi signifas, sekurigas sin per la referenco al la supra internacieco.

Jen taktiko, kiel samtempe proksimiĝi al la rigoraj „ŝemistoj“. Post la jarcentkvarono, *Kraft-Malovec* (1995) riskis plupaŝi: restis nur la dubinda „ekzistadismo“. Ĉu do la ĉeĥaj Eo-vortaristoj tiel volis manifesti sian apartenon al la misfama skolo de *Pič* (1984)? Nepe ne, tio estus maljusta akuzo. Sendube temis pri misatento, kiun *Kraft* (1998) almenaŭ parte riparis: sub la kapvorto *existencialismus* staras post la fuŝa „ekzistadismo“ denove la laŭnorma ekzistencialismo. (Gloso al laŭfundamentaj ŝemistoj: -AD- estas fundamenta, sed -ISM- „nur“ oficiala....).

2. informatiko. Ankaŭ ĉi-okaze apenaŭ eblas dubi pri vasta internacieco de la termino. Spite al tio, PIV lanĉas, sub la

oficiala radiko inform-, la derivaĵon „informadiko“, kiu estas ne tiom danĝera, ĉar la misformaĵo konsistas nur en unusola litero, do la komprenebleco restas kontenta. Malgraŭ ĉio, sciencisto vane cerbumos, kial necesis modifi la internaciaĵon. [Ree al la fundamentistoj: -IK- estas laŭ PAG (1980) neoficiala (pseŭdo)sufiksoido. . . ].

3. Ekzistas ankoraŭ pli danĝeraj -IK-ajoj, ekz. ĝardeniko, ĵurnaliko, lingviko. Laŭ PAG preferindas la internaciaj formoj -istiko. Senĉese aperadas eksperiment-emuloj pri birdiko (= ornitologio), insektiko (= entomologio) k.a. Tiujn mi dezirus ĝentile atentigi, ke apud la vortoj sciencaj povas bone ekzisti la komunuzaj: birdoscienco, insektoscienco, kosmosciencoj (por kosmologio, astronomio, astrofiziko k.t.p.), tersciencoj (por geologio, geografio, paleontologio k.t.p.), varmoscienco (por termiko) ...

4. meteorologio. Jen tute mala ekzemplo: danĝeran terminon povas generi ne sole laŭko, sed ankaŭ renoma sciencisto, kiu trotaksis eblojn de planlingvo. *Lewin* (1961), timante, ke meteoro portas tro multajn signifojn (ja ekzistas hidro-, lito-, foto-, elektro-meteoroj), lanĉis por atmosferaĵo nesolida sian inventon „meteo“. Ĉar li fariĝis koncernfaka kunlaboranto de PIV, ne estis por li malfacile kontrabandi la novismon en la ambician vortaron. Tiel sekvis bedaŭrinda izoliteco disde internaciaj normoj por

AVERTO ANTAŬ  
DANĜERAJ  
TERMINOJ

Josef Kavka

terminologio kaj nomenklaturu: dum la tuta mondo havas meteorologion, Esperanto unusola povas „fieri“ pro la pliracia „meteorologio“. Nun ĝi esperu, ke future oni akceptos la „plibonigon“. Siatempe io simila estis farita de *Zikmund* (1948) en Ĥemio. Bonŝance, tiu ti mishelpo al Esperanto restis sen sukceso; ĉi-koncerne kp. ankaŭ *Kavka* (1986).

Fontoj

*Kalocsay, K.* - *Waringhien, G.* (1980): Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. Kvara, tralaborita, eldono. - Universala Esperanto-Asocio, *Rotterdam*.

*Kavka, J.* (1986): Pri nove proponataj afiksoj el la vidpunkto taktika.. - *Scienca Revuo*, 37, 2, 43-49, *Pizo*.

*Kraft, K.* - *Malovec, M.* (1995): Slovník esperantsko-český. Vortaro esperanta-ĉeĥa. - *Kava-Peĥ Dobřichovice*.

*Kraft, K.* (1998): Česko-esperantský slovník. Ĉeĥa-esperanta vortaro: - *Kava-Peĥ, Dobřichovice*.

*Lewin, M.* (1961): Meteorologia Terminaro. - Jarlibro de UEA, dua parto, 129-189, *Rotterdam*.

*Piĉ, K.* (1984): Principoj de Esperanto. - Kolekto de referaĵoj el la internacia seminario Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko (AEST), 152-160, *Brno*.

*Waringhien G. k.a.* (1970): Plena Ilustrita Vortato de Esperanto (PIV). - Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris*.

*Zikmund, M.* (1948): *Návrh na změnu chemickéj nomenklatury zlučenin v esperante*. - *Chemické zvesti*, 2, 279-288.

Prago 11.2.1998

## Interlingvistikaj studoj



ĉe la Universitato de Poznan, pri kiuj ni informis pasintnumere, akceptas aligilojn je la adreso: Lingvistika Instituto de Universitato Adam Mickiewicz, ul. Miedzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznan, tel. +48-61 8618-572 d-ino Ilona Koutny, e-mail: ikoutny@hum.amu.edu.pl

- LA LASTA ELDIRO -  
- Fino de la Tempoĵ - Tria Jarmilo -

Detala kaj serioza studo pri la antaŭdiro de la profetoj ekde Jesaja ĝis la nuntempaj predikantoj, inkluzive de Jesuo, la Kristo, pri la evoluado de nia planedo kaj



de la ĉi tie loĝanta homaro. Mendebila ĉe UEA. Eldonis: Spirita eldona societo F.V.Lorenz, Caixa Postal 3133, BR-2001-970 Rio de Janeiro, Brazilo.

☆ Staro 2/1998 ☆

## INTERREDAKORE

# Ĉeĥa Esperanto Asocio

Český esperantský svaz  
p.s.1069  
111 21 Praha 1  
e-mail: [cea@net.cz](mailto:cea@net.cz)



- Co je Esperanto?
- Pisemné kurzy jazyka Esperanto
- Letní jazykové kurzy (nejen Esperanta) v Lančově u Vranovské přehrady
- O členství v Českém esperantském svazu

■ Tiel aspektas la TTT-paĝo de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Interneto ĉe adreso <http://www.kuk.cz/cea/>. La dika skribo kaj flago estas verdaj, la ĉeĥaj tekstoj blauj.

### ■ Ragnarsson omaĝe al Boulton

La solena matineo, dum kiu FAME-fondaĵo transdonos la 6-an Esperanto-kulturpremion de Aalen al d-ro Marjorie Boulton, okazos dimanĉon la 26an de aprilo 1998 en la urba biblioteko de la sudgermana urbo Aalen. La omaĝan paroladon por Boulton prezentos alia fama esperantista poeto, islandano Baldur Ragnarsson. Laŭ koncerna kontrakto, FAME disponigas la premiomon kaj la urbo aranĝas la matineon en Torhaus (pordega domo), kie troviĝas ankaŭ la biblioteko de Germana EsperantoInstituto. La

matineon, al kiu krom esperantistoj estas invitataj precipe aŭtoritatuloj kaj eminentuloj de la publika vivo, akompanos ekspozicio kun verkoj de Boulton.

### ■ Biblioteko savota

FAME-fondaĵo krome ĵus decidis, per 3000 germanaj markoj kontribui al savado de eminenta kolekto de precipe E-periodaĵoj, la biblioteko de fondaĵo Vanbiervliet en belga urbo Kortrijk. Post la morto de la fondinto, tiu biblioteko endanĝeriĝis pro manko de mono en la urba kaso. Flandra Esperanto-Ligo (FEL) trovis nun homojn, kiuj povos

daŭrigi la laborojn necesajn por savi la bibliotekon, sed FEL sola ne kapablis pagi la kostojn, kiujn nun je du trionoj transprenis FAME-fondaĵo.

■ Okaze de la 83-a UK, la urbestro de Montpellier proponas al ni ekspozicii pri Esperanto en la akcepteja halo de la urbodomo dum 3 semajnoj. Ni estus dankaj pro ĉia sendo de taŭga materialo pri lingva problemo, zamenhofologio, esperantologio, pri- kaj peresperanta informado, ankaŭ E-instruado en via lando/lingvo. Bv. tuj sendi al LKK, UK / Ekspozicio, 5 r du Docteur Roux, FR-34090 Montpellier

■ DUA KULTURA FESTIVALO DE ESPERANTO SANTJAGO DE KUBO Esperanto kiel komuna lingvo proksimigas nin kaj kontribuas diskonginajn tradiciojn kaj kutimojn, nian kulturon kaj gastigemon. La urbo Santjago de Kubo situanta oriente de la insulo estas valo hufoforma aperte al la Kariba Maro. Fondita de Diego Velázquez en 1514 estas nun la dua plej grava urbo en Kubo; ĉirkaŭita de la maro kaj montoj, varma kaj ĝoja, ĝi rolos perfektan sidejon de bunta kultura festivalo kiu prezentos la kuban kulturgamon en Esperanto. De la 20a ĝis la 22a de novembro 1998 efektiviĝos en Santjago, la plej kariba el la kubaj urboj, la IIa Kultura E-Festivalo kies slogano estos: Frateco, Paco, Amikeco. Dum tri tagoj oni ĝuos prelegojn, artajn prezentojn deklame, teatre, muzike. La temoj de la prelegoj rilatos al jenaj aspektoj:  
Esperanto kiel kulturponto interpopola.

Esperanto kaj ekologio  
Esperanto kaj frateco interhoma.  
Esperanto kiel fonto de amo, paco kaj lumo al jaro 2000.

Alberto G. Rodriguez Pineda, Kuba Esperanto-Asocio  
kubesp@mail.infocom.etecsa.cu  
<http://www.infocom.etecsa.cu/new/esperanto/index.htm>

■ BELARTAJ KONKURSOJ LIRO-98 Post la tre sukcesa "Liro-97" Urala Esperantista Societo kaj la redakcio de „La Ondo de Esperanto" invitas ĉiulandajn dezirantojn partopreni en la tradiciaj belartaj konkursoj „Liro-98".

1. Originala prozo
  2. Originala poezio
  3. Traduka prozo el la rusa lingvo: novelo de Anton Ĉeĥov "Vanjka"
  4. Traduka poezio el la rusa lingvo: poemoj de Valerij Brjusov, kies 125-jariĝo estas festata ĉi-jare.
  5. Eseo „Se mi estus prezidanto de UEA, mi ..."
  6. Primovada karikaturo
- La kvanto de la konkursaĵoj kaj ilia amplekso ne estas limigitaj. Bonvolu sendi tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekz-ojn de la originalo (por la 4a branĉo ankaŭ de la traduko) ĝis la 1-a de julio 1998 laŭ la adreso RU-620014 Jekaterinburg-14, ab. ja. 162, Ruslando. La karikaturoj devas esti senditaj unuekzemplere kaj uzi nur nigran koloron sur blanka papero.  
Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipton kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta



adreso.

Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj (po unu en ĉiu branĉo) ricevos valorajn libropremiojn. La rezulto de „Liro-98“ estos solene anoncita la 24-an de julio 1998 en la Somera Esperanto-Kursejo (Jekaterinburg). La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2000 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en „La Ondo de Esperanto“ aŭ en aparta eldonaĵo, kondiĉe ke ili avertos pri tio la aŭtoron ĝis 31 dec 1998.

#### ■ **Premiero de Esperanta muzikalo!**

La 26-an de julio 1997, la IJK en Assisi atestis premieran eventon en la movado: la unua muzika komedio en nia lingvo. La Nova Kompanio, el Blera (eta vilaĝo je 80 km norde de Romo) pretigis kaj surscenigis unu el la plej famaj muzikaloj en Italio: Venu Rapide Homoj (= Forza Venite Gente). Ĉi tiu muzika komedio tre fama en la medio, ankaŭ pro la popoleca kaj simpleco de la temoj kaj kantoj, rakontas pri la vivo de Sankta Francisko, la plej grava itala sanktulo. Ĉiuj scenoj estis tre fidelaj al la oficiala biografio de la Sanktulo, kaj do ĉeestinte la komedion oni certe povis ekscii multon pri la vivo de la „malriĉuleto“ de Assisi.

La dialogoj, tre ofte ironiaj, estis bone recititaj de la du rolantoj:

Bernardone (patro de Francisko), interpretita de Giovanni Monaci; kaj la Ĉifonulino, interpretita de Laura Galli.

Sep estis la aktoroj-kantistoj, kiuj rolis, ĉirkaŭ la du ĉefrolantoj: Francisko, interpretita de Pier Luigi Cinquantini kaj Klara, interpretita de Valeria Pagliari; plus aliaj 20 kompanianoj inter kunaktoroj kaj teknikistoj. Unu el la komentoj de iuj el la spektintoj estis la bona komprenebleco de la tekstoj kaj de la kantoj kaj de la dialogoj. La komedio eblis danke al la majstraj tradukoj de la kantoj fare de Giuseppe Castelli, dum la dialogoj estis tradukitaj de Pier Luigi Cinquantini.

La kompanio estas formita plejparte de gejunuloj, kiuj apartenas al la koruso kaj al la skolta grupo de Blera, kaj kiuj, antaŭ 4 jaroj decidis kuniĝi por reprezenti, ĉefe, muzikajn komediojn. Ĝi jam turneis en diversaj vilaĝoj de la regiono kaj per la teatraĵo en Assisi, transsaltis la barilon de la internacieco. Dum la „aventuro“ de la Esperanta versio diversaj kompanianoj fariĝis esperantistoj, dum aliaj tre simpatias al la „afero“.

La komedio estis filmita kaj oni antaŭvidas la produktadon de videokasedo, pri kiu eblos havi novaĵojn dum la venontaj monatoj.

pcinqua@tin.it

#### ■ **TEJO 60-jara!**

En Rijeka TEJO festos la sesdekan jubileon de sia ekzisto. Pri la historio de TEJO parolos Ivo Osibov, la iama prezidanto de TEJO, nun profesoro pri juro en la Universitato de Split. Rijeka-Montpeliero, kunligitaj per aŭtobuso

## La du malsamaj mondoj

Jam antaŭ unu jaro mi igis min gvidata tra spirita vojo, simile kiel pilgrimanto, kiu postsekvas lumon, kiu aperis al li en montoj. Laŭ hinda saĝo oni diras: Serĉu socion de la bono, ĉar ĝuste tie Li havas sian loĝejon. Tiam li aperis kaj montris al mi, kian vojon mi iru, kaj poste li foriris. Mi fartas bone en tiu ĉi mondo, kie almenaŭ por momento oni forgesas la realan tempon, mi ŝatas reveni tien, kie sonas medita muziko, kuracaj ŝtonoj konkuras en sia brilado kaj aromaj stangetoj sileante aromas en la spacon. Vaporo supreniras al misteraj teoj kaj areto da homoj havas ĉiam ion por diri al si reciproke.

Mi eniras en Agnesan monahinejon. Jam la konstruaĵo vekas mian senton. Sur podion eniras ok knabinoj vestitaj en bluj sarioj. La unuaj tonoj kaj unuaj voĉoj nin altiras alten en montaron, al la suno, al fonto de rivero, al floroj de lotusoj, sed ankaŭ al simplaj homoj. Fermetitaj okuloj da homoj signifas trankvilon kaj bonhumoron, aŭ vasperan meditadon. La muziko varmigas la koron kaj estas bone. La koncerto finiĝas, aŭdiĝas ŝtorma aplaŭdo kaj en la manoj de la knabinoj aperas bluj floroj. Ni ĉiuj sentas nin bone.



La sekvan tagon mi iras malrapide al loko, kie mi ankoraŭ neniam estis. Mi atendas de la hodiaŭa vespero la saman travivaĵon kiel hieraŭ. Fine la pordo malfermiĝis kaj la amaso estas enlasita internen. Ĉe plafono pendas la tibeta flago kaj sur ŝtupoj estas kandeloj. Anstataŭ teo oni proponas bieron kaj vinon. Post momento aromaj stangetoj ĉesigas la fetoron de marihuano. Nur malsupre en teretaĝo estas maltermita stando de hinda kulturo. Ludisto je orientaj muzikinstrumentoj klopodas superbrui la kriegantan amason, sed vane. Post unuhora malfruiĝo fine komenciĝas la koncerto. Tra la salonego aŭdiĝas bruado kaj kriego ĝis la kvina ĉakro elsendas eksteren avertan signalon kaj mia interna Mi diras „mi petas, tion ne!“ Ege mirus ia tibeta lamao, ke el

tiom belega instrumento, kia estas gongo aŭ tibetaj pladetoj, estas eble fari cimbalon. Post la unua komponaĵo mi forlasas la ĉambron. Mi paŝas sur trotuaro kaj super mi lumas la luno. En la koro mi havas trompiĝon, sed ankaŭ la respondon al la inversa flanko de paradizo. Tiamaniere junaj homoj imagas la spiritan mondon de la malproksima oriento.

La Esperanta komencanto Pavla Zemanová



## KRONIKO SOCIA



### NI GRATULAS:

#### 94 jaroj:

Janda Jan (Kolin)

#### 92 jaroj:

Bukač Josef (Poděbrady)

Ludkářová Ludmila (Hradec Králové)

#### 85 jaroj:

Belda Evžen (Tanvald)

Mančík František (Horní Němčí)

Karásková Alžběta (lomouc)

#### 80 jaroj:

Krystl Václav (Heřmanova Huť)

Štefanová Věra prom.ped. (Kladno)

Vozáková Anna (Slavičín)

#### 75 jaroj:

Grym Bedřich (Haviřov-Město)

Hrdličková-Cichová Jana (Čemovice u Táb.)

Hebďová Wanda (Albrechtice u Č.T.)

Honsová Jiřina (Zlín)

Hradecký Jaroslav (Jablonec n.N.)

Kolman Bedřich (Lipov)

Pachner Josef (Praha)

Procházková Jiřina (Kuřim)

Slavíková Anna (Brno)

Šemíková Růžena (Železný Brod)

#### 70 jaroj:

Damašková Marta (Praha)

Heiserová Ludmila (Haviřov)

Herclová Marie (Praha-Nusle)

Chlapec Emil (Teplice)

Kopecská Věra (Praha)

Laštovková Dagmar (Praha)

Mlýnková Jindřiška (Zlín)

Puklický Jan (Praha-Libeň)

Řezáčová Vlasta (Písek)

Řitička Zdeněk (Volary)

Štrobil František Ing. (Zlonice)

Vaverková Zora (Brno)

Žáček Miloslav Ing. (Kosmonosy)

#### 60 jaroj:

Bělohradský Vladimír (Liberec)

Dohnal Karel (Budišov n.B)

Dudová Drahomíra (Přerov)

Holan Jiří (Haviřov-Město)

Ježek Karel (Mimoň)

Kalous Jaroslav (Domažlice)

Petr Ladislav Ing. (strava-Hrabůvka)

Rosypal Jiří Ing. (Brno-Soběšice)

Tichý Pavel Ing.,CSc. (Litomyšl)

#### 50 jaroj:

Hanáčková Vlasta (Blatnice p.sv.Ant.)

Kovář Ladislav (Česká Třebová)

Kujanová Mária MUDr. (Chýnov)

Rakušan František (strava-Zábřeh)

Souček Bohuslav (Hradec Králové)

Štencel Antonín Ing. (Šumperk)

Tůma Pavel (Velim-Nová Ves)

Tušil Karel (Vodice)

Vojtěchová Jaroslava (Liberec)

Zatloukalová Božena (Brodek u Konice)

### NI KONDOLENCAS

- En Liberec mortis **Miloš Hruška**

- En Přerov forpasis **PhMr. Vlasta Peroutová** en aĝo de 79 jaroj.

- **Ernesto Vaňa** mortis en Dudince, Slovakio, la 19an de marto, en la aĝo de 90 jaroj. Elstara slovaka esperantisto, multjara prezidanto de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio kaj redaktoro de ties organo Esperantista Vegetarano, fondinto de la gazeto Esperantisto Slovaka kaj organizinto de E-renkontiĝoj en Dudince.

- **Roland Grandier**, multjara prezidanto de SAT, forpasis nokte 16/17 marto 1998. Pro sanstato li forlasis la prezidantecon de SAT-Amikaro okaze de la kongreso de Limoges, en 1997 (la prezidantecon transprenis Jean Selle, redaktoro de la asocia organo „SAT-Amikaro“).



## Scivole tra Esperantujo

**ESPERANTO-Klubo STRÁŽNIČAN** en Strážnice, distr. Hodonín, kunlabore kun **ESPERANTO** sekcio de AĈS - Asocio de ĉeĥaj filatelistoj, organizas sabate, la 18.04.1998, la kutiman Kolektantan renkontiĝon en la urba Kulturdomo STRÁŽNIČAN. Pluajn informojn rekte ĉe: **ESPERANTO**, poŝtkesto 36, 696 62 STRÁŽNICE, distr. Hodonín, tel.: 0631/334 905, 334 762, telefakso: 0631/334 575.

**ADONIDO** (*hlaváček jarní*), rara floro kreskanta en suda Moravio, fariĝis simbolo de la jam tradicia renkontiĝo de esperantistoj en Vracov, Milotice, Ratiškovice. Ĉijara renkontiĝo dum semajnfino 25/26 de aprilo 1998 vizitos kastelon en Milotice, herbejon kun la adonido kaj kompreneble vinkelon. La tranoktado ĉe lokaj esperantistoj. Aliĝu ĉe Jana Melichárková, 696 02 Ratiškovice 938, tel. 0628/367 404.

**POLA RADIO 39-jara!** Kompreneble ni parolas pri Esperanto-elsendoj, kiuj la 4-an de aprilo 1998 eniris en sian 40-jaron. Aktualaj frekvencoj: **6.30 h** nur per satelito; **15.30 h** 41,18 m (7285 kHz), 41,09 m (7305 kHz); **20.00 h** 41,64 m (7285 kHz), 49,22 m (6095 kHz); **22.30 h** 41,18 m (7285 kHz), 41,27 m (7270 kHz). 49,22 m (6095 kHz), 49,71 m (6035 kHz). Temoj: Homoj kaj problemoj, Koncerto kun

bondeziroj, Esperanta gazetaro, Familiaj temoj, Kulturtemoj, Esperanto-ekspreso, Leterkesto. Krom la klasikaj elsendoj ekzistas nun 4-minuta informa sona servo pri Esperanto en Internet atingebla ĉie kaj ĉiam en la tuta mondo:

<http://www.wrn.org/stations/poland.htm>

Krome eblas viziti ankaŭ hejman paĝon de Esperanto en Pola Radio kun detalaj informoj pri elsendoj:

<http://members.aol.com/OSIEK/AERA>

### Korespondi deziras

- Mi estas japano, kiu studas pedagogion de Célesten Freine, franca instruisto kaj esperantisto. Mi deziras kontakti ĉeĥajn instruistojn, kiuj praktikas lian metodon. Mia adreso: MURAJAMA Rjo, Hjogoken Kobe-si Hjogo-ku Arata-ĉo 1-6-24, Japanio.

### Jarkunveno en Přerov

La 4-an de marto 1998 estis tago, kiam en Přerov denove renkontiĝis anoj de la klubo kaj gastoj el Prostějov, Olomouc, Ostrava, Opava, Havířov kaj Hranice n. M. por bilanci jaron 1997. Esp. klubo, kiu post la inundo ne havis lokon por kunvenadi kaj ankoraŭ havas problemon kun sia biblioteko, trovis novan tegmenton en Lokomotiva deponejo en Přerov-a fervojstacio. La unuan merkredon de ĉiu monato ni tie kunvenadas por pliperfektigi niajn lingvosciojn kaj por aliaj distraj programoj.

Ni daŭre kunlaboros kun E-klubo en Prostějov, Olomouc kaj Hranice n. M., grimpos sur monto Čantorio kaj ĉefe vizitos UEA-kongreson en Francio kaj

jubilean 50-kongreson de IFEF en Danlando. Prezidanto de ĈEA inĝ. VĽ. Kočvara informis nin pri planoj de ĈEA kaj reprezentantoj de aliaj kluboj pri ilia agado dum la diskuto. Ni proklamis la jaron 1997 sukcesa, sed ni devas plu labori por Kampanjo 2000 kaj por gajni novajn junajn esperantistojn.

**Ekspozicio Komenský-Zamenhof** gastis inter 10.3.-5.4.1998 en Ŝumperk. En junio la ekspozicio revenos en la urban muzeon J. A. Komenio en Pŕerov. La loka klubo kompletigos ĝin per du paneloj kun historiaj fotoj pri la estiĝo de la klubo, en oktobro estos inaŭgurita memortabulo kaj prezentita kvizo de la urbestro pri Pŕerov kaj pri Esperanto en la urbo. Ni ne malkaŝos, kiam la klubo estis fondita, ĉar temas pri kviza demando. En marto prelegis la direktoro de la muzeo d-ro Hýbl pri Komenio kaj Zamenhof antaŭ publiko.

*L. Filipová*

### **Pedagogoj en Prago**

renkontiĝis sabate la 7-an de marto 1998. Partoprenis 17 membroj, el kiuj 7 estis samtempe ILEI-anoj. Apudĉambre kunsidis la estaro de ILEI kun UEA-representanto. Niaj membroj povis konatiĝi kun la funkciuloj unue en diskuto, poste vespere en bierkelo en amika rondo.

La pedagogia sekcio intencas modernigi la korespondajn kursojn kaj prepari du korespondajn semajnfinojn:

11.-13.9. en Moravio (Olomouc aŭ Vracov)

4.-6.12. en Bohemio

Ni invitas ĉiujn, kiuj deziras labori en la pedagogia sekcio. Skribu al la sekciestrino:

Jana Melichárková, 696 02 Ratiškovice 938, tel. 0628/367 404.

### **ILEI-estraro kunsidis en Prago**



En la foto estas la pintaj funkciuloj de ILEI kaj UEA dum interparolo kun la membroj de Pedagogia sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio okaze de la ILEI-estrarkunsido en Prago 1998-03-06/08. De maldekstre: vicprezidanto de UEA respondencanta pri la kunlaboro inter UEA kaj ILEI Renée Triolle (FR), Atilio Orellana Rojas (AR), respondeculo pri ILEI konferencoj kaj ekzamenoj, Stefan MacGill, estinta ILEI prezidanto, kiu gaste prezidiis la pragan estrarkunsidon (pro neĉeesto de ILEI-prezidanto Duncan Charters, nun komisiito pri ILEI-eldonado, Marija Beloŝević (HR), ILEI-sekretario kaj Bertil Andreasson, respondeculo pri financoj kaj membraro de ILEI.

foto: P.Chrdle

### **Papo parolis Esperante**

dimanĉe la 12-an de aprilo 1998 dum la tradicia tagmeza alparolo „Urbi et orbi“. Post multaj lingvoj, antaŭ la pola kiel la lasta, li diris: „Esperanto: Felician Paskon en Kristo resurektita.“ (Ĵus mi aŭdis en televido - red.)

### Nova libro el la persa

Mi tre ĝojas informi vin ke la persa traduko de la libro „Esperanto“ de Pierre Janton aperis lastmonate. La tradukon faris s-ro Kamali, mia amiko kaj e-isto el la urbo Mashad, kiel sian universitatan disertacion. La libron eldonis eldonejo Atai en Tehrano. Oni atendis kelkajn jarojn por ties apero kaj finfine lastjare la eldonisto kuraĝis komenci eldonadon de la libro. Oni esperas ke la nova libro, kiu aldoniĝas al ties alilingvaj tradukoj, multe utilu por konigo de nia lingvo kaj movado al perslingvanoj kaj helpu kreskigi iraninan e-movadon.

Keyhan Sayadpour  
sayad@www.dci.co.ir

### Kontrolado de Libroservo

Per ĉi tiu foto ni volas iom prezenti al vi laboron de la funkciuloj de ĈEA



Esperanto-Asocio dum inventarado de ĈEA-libroservo. Prezidanto de inventara komisiono kaj sekretario de ĈEA Kvĕta Krajiĉková registras librojn de libroŝranko. La kontrolo de libroj realiĝis la 6-an de aprilo 1998.

*Foto: P. Chrdle*

### PASPORTA SERVO 1998

Se vi aĉetos ĉi broŝuron, vi povas senpage tranokti ĉe 871 gastigantoj el 75 landoj, laŭ kondiĉoj menciitaj en la broŝuro. Jen bonega maniero por ekkoni landojn kaj homojn per Esperanto. Se vi volas akcepti interesajn E-gastojn en via hejmo (laŭ viaj kondiĉoj), fariĝu gastiganto. Tiel vi ricevos senpage la broŝuron kune kun ĝiaj servoj.

